



Informoj:
Arto -- Literaturo
Turismo -- Sciigoj

NIA VIVO

Administracio
kaj Redakcio:
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS

† 14 APRILO 1917

La famon ne brue,
Nur poste malfrue,
Simile al eño de mortkrio
Mallonga sciigo alportis:
«LA MAJSTRO MORTIS».

JULIO BAGHY.

AL LA INFANETOJ

EL ALPHONSE DAUDET

Infanoj, vi antaŭ nelonge naskitaj
Busetoj, lipetoj, duone fermitaj,
Nazetoj logantaj malseriozaj,
Membretoj marmoraj
Kaj floraj
Kaj rozaj;

Infanoj, vi antaŭ nelonge naskitaj,
Pro l'aĝoj al ĉiuj de vi donacitaj,
Vi ĉiam ni benos, ho hejmaj juveloj,
Esperoj lulilaj,
Dormante trankvilaj
Anĝeloj!

Pro la malfermitaj timeme okuloj,
Kaŝitaj sub drapoj neĝblankaj karuloj,
Ĉu vi ekridegas, ridetas aŭ ploras,
Pro la malbonhumoro,
En kiu la koro
Doloras,

Pro ĉio, pro via senĉesa babilo,
Vi estu benataj en via lulilo!
Ho, kiom da amoj, da flamaj esperoj
Vi naskas, paruaj
Kapetoj kaj bruaj
Paseroj!

En domo vi estas feliĉo kaj kanto
Simile gajigas la arbon lekanto;
La akvo, la kanon flekseman; la stelo
L'arkajon de l'brila
Semlima trankvila
Ĉielo.

El la franca lingvo tradukis,
G. PHILIPPET.

LA JAPANA PROPRA MATEMATIKO

EL MICUŬO NOGUĈI, JAPANA SAMIDEANO

(Antaŭparolo)

Nuntempe en Eŭropo oni ankoraŭ donus la honoron de iniciatoro de diferenciale-integralo al du majstroj Newton kaj Leibniz. Tio tamen estas granda malprava afero, mi forte devas vin atenti pri tio, kaj mi kiel japano havas la devon konvinki tiujn, kiuj ankoraŭ subtenas la suprecititan eraran konon.

Elpenso kaj eltrovo estas en iu senco la produktajo de la epoko. Ja tial eĉ majstro Einstein ne povus konstrui la relativan teorion, se ne ekzistus la Rieman-Geometrio en la epoko, kiun la majstro vivis. Kion rakontas la fakto, ke en same epoko diferenciale-integralo estis elpensita de la du reciproke izolitaj, sendependaj sciencistoj? Ankaŭ ĉi tie elpenso estas la naskitajo de la epoko kaj tial povas esti la ekkono, ke krom ili estus alia iniciatoro de la scienco. Jes, certe tio estas; kaj mi de nun intencas prezenti al vi la argumenton pri tio. La argumento konsistas el la japana propra matematiko, nome «Ŭasan». (Tiu ĉi vorto «Ŭasan» laŭvorte estas japana kalkulo).

Nun mi komencas prezenti al vi ĝiajn historieton kaj enhavon.

(La Historieto)

1) Estas fakto, ke neniam rimarkinda scienco kreskis ĝis la epoko «Meiji» (1868-1912) en nia lando, tamen kontraŭe nur matematiko progresis en la mirinda grado de la granda logika konstruajo.

La matematiko, same kiel ĉiuj aliaj kulturoj kaj civilizacio; estis importita el Ĉinujo kaj la importo estis farita en iom antikva tempo. Sed oni ne povas trovi rimarkindan postesignon de la progreso en la matematiko antaŭ la batalema epoko, kiu okazadis en la historio de nia lando de la 1467.^a jaro ĝis la 1585.^a same kiel en Eŭropo okazadis la malluma epoko en la daŭro de mil jaroj. Kompreneble en la batalema tempo ne povas ekzisti la kaŭzo, ke scienco sufiĉe daŭrade progresas, kvankam nur la porbatalila scienco

povas esti prospera en la mirinde granda formo. Sed tiu abomeninda epoko finiĝis, kiel kun la brila radio de la leviĝanta suno aperis Renesanco en eŭropa historio post la longega malluma epoko, dank' al la ekapero de heroo Hootaiko, kiu penadis pace estigi la tutan landon. Tiele la tiutempa popolo ĉesiginta batalon ekokupis sin en la kreado de arto kaj scienco. Ankaŭ matematiko povis fariĝi la granda studobjekto de tiutempaj enpensemuloj. S-ro Moori-Kanbee (la 16.^a-17.^a jarcento), vasalo de la heroo Hootaiko, estas nomata la iniciatoro de la matematiko «Ŭasan». Oni diras, ke liaj instruoj verkis kelkajn librojn, nome «Ĵinkooki», «Ĵugairoku» ktp.

2) S-ro Kooŭs Seki (1642-1708), triageneracia posteulo de S-ro Moori-Kanbee, estas la plej kompetenta kaj bonekonata matematikisto en la historio de la matematiko «Ŭasan». Li reformis la metodon «Tengenjucu», kiu estas la elementa parto de la nuntempa algebro; kaj poste li elpensis multajn utilajn metodojn, nome «Tengenendanhoo», «Tensojucu» ktp. (La vortoj «jucu» kaj «hoo» signifas rimedon aŭ metodon), kiuj koncernas eliminometodon kaj la ĝeneralan algebran operaciometodon.

Krom tio ĉi li fine atingis la teorion nomatan «Enri» (Tiu ĉi vorto laŭvorte signifas cirklo-teorion), kiu respondas al integralkalkulo. Tiu ĉi metodo celas sciigi tute analitike la longecon de parto de cirkonferenco kaj la areon de arbitra kurbo, sekve ĝi kompreneble apartenas de integrala metodo. Ĝi ne estas tiel logika, kiel la integralo ordigita de Newton; ĝi tamen estas pli progresinta ol ĉiu metodo, kiun oni povas trovi en Eŭropo antaŭ la epoko, en kiu vivis Newton. Cetere li ja kreis la metodon pli frue ol Newton. La diferenciala ideo ne sufiĉe progresis en mia lando, kvankam S-ro Seki ekirinte de la limoideo fine konstruis la teorion «Enri», sed tio ĉi estas tute neevitebla pro tio, ke por la matematiko «Ŭasan» ne estis la stimulo de fiziko kaj astronomio, ĉar la origino de matematiko ĉiam estas en la naturo. Kompare kun tio, ke Newton kaj Leibniz kreis pro la neceseco de naturscienco, ni povas opinii, ke la supereco de S-ro Seki, kiu originalis la teorion sen tia neceseco, devas esti pli granda kaj admirinda ol tiu de ili.

3) Post la morto de S-ro Seki, liaj posteuloj konservis lian instruojn kiel sekretaĵojn ĝis la komenco de la epoko «Meiĝi». Oni diras, ke tiu ĉi estas Seki-isma matematiko el de la «Ŭasan». S-ro Rjoosuke Macunaga, la triageneracia posteulo de S-ro Seki, ordigis perfekte la restigitajn teoriojn de sia majstro, S-ro Seki; kaj S-ro Ĉjokuen Josujima, la kvinageneracia posteulo de S-ro Seki, ilin multe, profunde studadis kaj progresigis en la supera grado.

S-ro Jasuaki Kūaida (1747-1817) diskutis severe pri la matematiko kun la tiutempa Seki-isma Ŭasamisto, S-ro Teisuke Fujita (1734-1807), ĉi tiu skolo daŭris ĝis la homenco de la epoko Meiji.

(Daŭrigota).



VIRINA OPINIO



Jam de longe multe oni diskutadas kaj eĉ priokupiĝas pri la edukado kaj kulturado de la virino. Ankoraŭ kredas multaj personoj, ke ne estas konvene, ke tiuj kulturado kaj edukado estu similaj al la viraj, ĉar preskaŭ ĉiam oni diras kaj pensas, ke saĝa virino ne povas fariĝi, aŭ esti bona kunulino de la viro se la inteligento de tiu ĉi ne estas supera rilate al la virina. Kompreneble sed... kiamaniere ili povas kompreni nin plibone, se ne per similaj edukado kaj kondiĉoj de la sentoj.

De kiu ajn vidpunkto oni observas la virinedukadon, oni vidas malfeliĉe, kiel malsama ĝi estas, laŭ ĉiuj rilatoj de tiu viro. Dum la viro fariĝas forta, la virino de sia infaneco kutimiĝas serĉi konsolon por siaj ĉagrenoj per larmoj, trovante nek alian nek pli facilan rimedon, kaj farante tiel honoron je sia malforta sekso, anstataŭ fortigisian koron per pravaj kaj filozofiaj pensoj, por eviti eblajn kaj ĉiutagajn malfeliĉojn. Kaj tiamaniere kun malforta koro, kaj ankaŭ inteligento, kreskas la infanino, kiu, poste aliformiĝos je virino por esti patrino.

Patrino!! Jen la plej belega vorto! Tamen, por fariĝi patrino ne sufiĉas la ago edziniĝi kaj havi aŭ naski filojn, estas necese ankaŭ, ke la virino konsciŭsian agadon, sed kompreneble tiu ĉi konscio ne kreskas per si mem kaj estas necese enradikiĝi ĝin per la studado, per la laboro de la inteligento kaj per evoluigo de l'koro.

Se en simpla konkurekzameno necesas esti tre bone preparita, por atingi sukceson, mi demandas ĉu por la plej grava kaj bela celo de la vivo ne estas ankaŭ nepre necese preparigi tre solide? Kiom da grandaj malplezuroj oni evitus en la vivo, precipe geedzaj, se la virino estus moraledukata kaj alte instruita! Tiamaniere ŝi povus esti la ĉefa edukanto de siaj filoj kaj la plej perfekta kunulino de sia edzo.

Oni povas ja aserti, ke preskaŭ neniam mankas al ŝi koro en siaj agadoj, sed multajn fojojn ĝi estas grava malkonvenajo, ĉar, ju pli troa estas tiu ĉi amo, des pli malutila rezultas. Ofte pro tro granda amo naskiĝas malpaco kun la edzo kaj, kontraŭ la toleremo pri la kapricoj de la filoj fariĝas ilin pro tio mem malfeliĉaj. Nu, dum la patro plenumas sian devon laborante por sia familia subteno, la patrino restas en la hejmo, kiel mastrino kaj gvidanto de siaj karaj estaĵoj, kaj

bedaŭrinde... se al ŝi mankas sufiĉa moraledukado kaj kulturo ne povos scii gvidi ilin rekte, kiel fortaj arboj, kiuj ian tagon fruktodonos sen malbonaj inklinoj nek venintaj ideoj forŝireblaj. Poste, kiam tio jam havas neniun rimedon, tiam pri ĝi oni plendas kaj pli ol unu fojon ŝi dolore ekkrias: Se mi denove naskiĝus, certe, agus malsame!!

Vidu do, nian pravigitan deziron fari nin moraledukataj kaj kleraj virinoj. Estas nepre necese do, havi por tio saman edukon por pli bone interkompreni nin reciproke kaj plie, por ke ni estu perfektaj *patrinoj* kaj konsciantaj civitaninoj.

VICTORIANA BUENO MENDOZA.

LA PLEJ VASTA AKVUMPLANO EN LA MONDO

Ĉi tiu planita, inĝeniera konstruaĵaro estas en Hindujo. En la dua semajno de la nunjara januaro oni inaŭguris ĝian digon nomatan Lloyd en Sukkur kaj estas preskaŭ nekalkulebla la profito, kiun ĝi liveros al miloj kaj miloj da hindoj. Ni povas per mallonga frazo komprenigi ĝin al niaj legantoj, dirante ke ĝi akvumados kaj sekve igos fruktodona la ĝis nun preskaŭ senhoman valon de rivero Indo, kies etendiĝo estas je 10.000 kvadrataj mejloj. Ĉi tiu vastega teritorio, proksimume same granda, kiel la kulturata parto de Egiptujo, estis dum jarmiloj preskaŭ tute neproduktema pro manko de akvo. De nun por ĉiam ĝi estos treege riĉa.

Laŭ kalkulo pri la rikoltoj, kiujn baldaŭ ĝi liveros, oni vidas, ke nur tiu de tritiko konsistos el unu kaj duono milionoj da tunoj. Ankaŭ estos produktata grandega kvanto da rizo, oleaj grajnoj, indiĝenaj manĝogrenoj kaj kotonono. Lando ĉiam minacata de malsatego estos baldaŭ riĉa kaj prospera.

Rilate la teknikan vidpunkton la konstruado de la digo en Sukkur estas komparebla al neniuj aliaj pro sia graveco. Estas rimarkinda fakto, ke la kosto de la digo rezultis malpli granda, ol la unue kalkulata. Ĉar la digo jam estas finita, nun nur restas fini la duan planparton, t. e.: la elkonstruon de la multenombra, akva kondukreto, konsistanta el 6.000 mejloj da ĉefaj kanaloj kaj 31.000 da kanaletoj, por ebligi la akvumadon je la tuta regiono.

La plano estas tiel kolose gravega, ke oni povas certigi, ke ĉi tiu akvumaranĝo estos ja la plej vaste efektivigita en la mondo.

Jen la plej bona maniero elspezi la ŝtatan monon en la nacioj, kreante riĉecon kaj ebligante al la popoloj ĝui materian bonvivadon, preskaŭ ĉiam altirantan samtempe la moralan aktivemon, kiu dignigas ĝian ekzistadon.

RAMÓN SALAS.

SCIIGOJ

De S-roj C. Bax el Dordrecht (Holando) kaj R. Kleanx el Sidney (Australio) ni ricevis gratulojn pro la publikigo de NIA VIVO. Ili deziras al ni prosperojn kaj longan ekzistadon. Ni dankas al tiuj estimataj samideanoj tiujn ĉi bondezirojn.

S-ro Ministro de Ĉeĥoslovakio en Madrido sendis al la Hispana Esperanta Konfederacio broŝuron bele kaj esperante verkitan pri la IX.^a Tut-sokola Kongreso (Sokol-Falko) okazonta en junio kaj julio de la nuna jaro en Praha. En tiu kongreso partoprenos aktive Sokoloj el Jugoslavio, Polujo kaj Rusoj elmigrintoj.

Dum la Kongreso sin prezentos samtempe 15.000 gimnastoj. Okaze de la Kongreso oni aranĝos grandan sokolan kaj gimnastan ekspozicion, modelan tendaron, konkurojn en remado, ktp.

Tiu esperanta broŝuro entenas priskribon de Praha kaj ĝia ĉirkaŭaĵo kaj avertojn por la vizitontaj fremduloj.

La hispanaj fervojoj konsentis rabaton por la karabano al XXIV^a Kongreso de Parizo.

La alestontoj devos sin turni al S-ro Andrés Piñó, Colón, 24, Valencia.

SPRITAĴOJ

La alian tagon pluvegis. Mi kredis, ke iu sinjoro, kiu iris antaŭ mi sub pluvombrelo estis mia amiko Johano kaj mi, batetante la ŝultron, al li diris:

—Donu al mi mian pluvombrelon.

La nekonato sin turnas al mi; li donas al mi la pluvombrelon kaj diras:

—Mi ne sciis, ke ĝi estas via.

—Ne neu plu ĉar dek personoj deklaris, ke ili vin vidis, ke vi ŝtelis.

—Kaj mi povas prezenti dek mil, kiuj ne vidis min.

PENSOJ-

Singadermo kaj amo ne povas kunfratiĝi.

AGESILAO.

Larmo por mortinto elvaporigas; floro sur ĝia tombo forvelkas; nur preĝo por ĝia animo estas prenita al si de Dio.

Pentofaro sen penado estas nefruktodona.

SANKTA AGUSTENO.

LA SEVILJA DELOGISTO KAJ STONA GASTO

SCENO IV

*Isabelo, Don Juan, Don Pedro, gardistoj**Don Pedro.* Kaptu lin.*Don Juan.* Kiu kuraĝos?...

Mi povos perdi la vivon,
Sed mi tiel ĝin defendos
Ke sendube pentos iu.

Don Pedro. Mortigu lin.*Don Juan.* Kiu trompas

Vin? Jen preta por mortigo,
De l'hispan'—ambasadoro
Mi estas la kavaliro.
Venu vi, ĉar sole vi
Estos mia arestinto.

Don Pedro. En tiun apudan ĉambron
Iru ĉiuj kun virino.

SCENO V

*Don Juan, Don Pedro**Don Pedro.* Ni jam estas solaj: montru
Nun bravecon kaj fortikon.*Don Juan.* Malgraŭ mia kuraĝeco
por vi, onkl', mankas maltimo.*Don Pedro.* Kiu vi estas?*Don Juan. (dissolvante sian mantelon).* Nev'via;
Vi jam aŭdis mian diron.*Don Pedro (flanken).* Ve. mia kor' antaŭsentas
Ian timeblan perfidon).

Kion vi faris por trafi
En jenan situacion?
Kuraĝa, malobeema,
Rakontu tuj, ĉar deziron
Vin mortigi, mi jam sentas.
Raportu, rapide, finu.

Don Juan. Onklo kaj sinjoro mia,
Juna mi estas kaj tio,
Ĉar vi estis iam juna
Kaj konis amajn intrigojn
Senkulpigu mian amon.
La veron al vi mi diros
Pro via devigo. Aŭdu:
Mi amtrompis la dukinon
Isabelon, ŝi sin donis
Al mi...*Don Pedro.* Haltu, ne daŭrigu.
Kiel vi trompis? Mallaŭte
Parolu.*Don Juan.* Per la ŝajnigo
Ke mi estas duk' Oktavo...*Don Pedro. (flanken)* Sufiĉe, jam plu ne diru.
(Ho ve, se la reĝo scias
Tiun okazon. Sed kion
Mi faros jen? En afero
Tiel grava l'artifiko

Nur helpos al mi).

Malnobla,

Ĉu tiu granda perfido
En Hispanujo farita
De vi al nobel virino
Kun stranga fort' kaj kolero
Ne sufiĉis? Ankaŭ tion
Vi faris en Neapolo,
Al tia altrangulino
Kaj eĉ en reĝa paŝaco?
Pro ĝi vin elpunu Dio!
Via patr' el Kastilujo
Venigis vin en ĉi tiun
Regnon. Italmara bordo
Ŝaumanta, kiel amikon
Vin akceptis atendante
Ke vi ĝin dankos por tio,
Kaj vi ja ĝian honoron
Ofendis en nobelino!
Sed en ĉi tiu okazo
Prokrasto nur malutilos,
Kion intencas vi fari?

Don Juan. Mi, malvirtan senkulpigon
Ne volas al vi prezenti.
Sinjor' onklo, mia vivo
Nur estas via: bonvolu
Finigi ĝin kaj punigon
Tiel por kulp' mi ricevos.
Antaŭ vi, mi, submetito,
Genufleksas: jen la glavo.*Don Pedro.* Levu vin, montru maltimon,
Ĉar mia severegecon
Vi ĵus venkis per humilo.
Ĉu el ĉi tiu balkono
Vi provus malsupreniron?*Don Juan.* Jes, sinjor', por vin obei
Mi portas sur mi flugilojn.*Don Pedro.* Nu, mi volas al vi helpi.
Milanon en Sicilion
Iru kaj loĝu sekrete.*Don Juan.* Mi tien iri rapidos.*Don Pedro.* Certe?*Don Juan.* Certe.*Don Pedro.* Per leteroj,
Mi pri sekvoj vin sciigos,
De tiu afer' malĝoja
Kiun vi kaŭzis*Don Juan (flanken).* (Ne: diru
Ke por mi nur estis ĝoja).
Mi estis kulpa pri ĉio.*Don Pedro.* Via juneco vin trompas.
El balkon' malsupreniru.*Don Juan.* Pro via justpeto, ĝoje
Hispanujon mi reiros.

El la hispana lingvo tradukis
V. INGLADA.